

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

Jarabono : 40 fkoj

JANUARO - FEBRUARO

1980 - 1

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

KULTURAJ KAJEROJ

1980 JANUARO-FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Robert Houdin, majstro de la magiistoj E. Motillon

Pri nod-arto « macramé » B. Cheverry

La atlantika dorsalo

La unuaj ludoj en Olimpio

La hundo de la senmorteco I. Nagy

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

LA ESPERANTO-DOMO (SEKVO)

... La ĵaŭdaj vojaĝoj de Ges-roj Micard daŭris. Sed nun estis senĉesa iro kaj reveno inter Baugé kaj Epineux-le-Seguin, ĉar la traktadoj por la aĉeto estis tre malfacilaj. La financa aranĝo estis jena : la tuta bieno estis âĉetota de du personoj : unuflanke de S-ro Micard por la Asocio, aliflanke de iu lignovendisto, kiu intencis dehaki la belegajn arbojn de la arbaro kaj vendi ilin. Sur la bazo de 3.500.000 frankoj por la 8 hektaroj ĉirkaŭ la kastelo, Micard volis malaltigi tiun prezon ĝis 3.000.000 frankoj kondamnante arbojn de « sia » parto, kaj metante ilin je la dispono de la lignovendisto. La prezo de ĉiu arbo estis diskutata. Fine la traktadoj sukcesis kaj Micard sendis la trian cirkuleron :

« S-ro Philippe venis la duan de novembro. Post longa rigardo li diris : « Mi admiregas ; estas por ni belega afero. » Ni tuj decidis la aĉeton. Sed je la fino de la tago la vendisto postulis de ni 3.500.000 frankojn pro la vasteco de la parto de la bieno kiun ni deziris. Ni ne akceptis tiun postulon. La postan tagon mi denove traktadis kaj post longa diskutado pri la diversaj dikaj arboj faligontaj, mi sukcesis aranĝi la aferon por tri milionoj.

Tiam S-ro Philippe estis en Parizo. Li telefonis al mi la 4an de novembro. Mi donis al li la detalon de la interkonsento kaj li donis al mi sian aprobon. Do mi subskribis hieraŭ vespere (4-an de novembro) paperon kun la reprezentantoj de la vendisto kaj nia kasisto pagis per poŝta ĉeko la sumon 1.500.000 frankojn. Ni poste pagus po 500.000 frankoj la 15an kaj la 30an de novembro kaj la 15an de decembro. Kiel eble plej rapide ni ankaŭ pagu la impostojn : pli ol 700.000 frankojn.

Bedaŭrinde la posedantino deziris ricevi la tutan sumon plej malfrue la 30an de novembro. Mi ne povis promesi tion. Se la posedantino ne konsentos kun nia pago-plano oni redonos al ni la ĉekon kaj ĉio estos rekomencota. La Ĝenerala Asembleo de la 16a de septembro donis al mi la necesan povon por traktadi sed tamen mi ŝatus ricevi nun vian aprobon. Mi asertas al vi ke tio estas bonega afero. Nun ni devas trovi la necesan sumon. S-ro Philippe promesis helpi nin. Mi mem alvokos miajn amikojn. Agu same kaj, se vi povas, montru la ekzemplon. »

Sed, ve. La posedantino ne akceptis la proponon kaj postulis kontantan pagon... per orbrikoj. Novaj traktadoj estis necesaj. La diskutoj estis akraj dum la tuta tago 15-a de novembro. La lignovendisto postulis 3.000.000 frankojn. Ĉar la vendisto ne volis cedi, Micard foriris el la bieno sed, sur la placo Anne de Melun, en Baugé, li ŝajnigis paneon de la aŭtomobilo. La lignovendisto baldaŭ sekvis, haltigis sian aŭton por informiĝi kaj la diskuto rekomenciĝis sed sur aliaj bazoj. Ĝis nun oni priparolis nur la prezon de la arboj. Nun la lignovendisto konfesis, ke mankas al li 2.000.000 frankojn por fari tujan pagon. « Ni povas doni tiun sumon al vi », respondis Micard. La lignovendisto fine cedis forlasante la kontestitajn 100.000 frankojn. Papero estis tuj subskribita sur la motoro mem de la aŭtomobilo ĉar ne ekzistas tablo sur la Placo Anne de Melun.

La 19-an de novembro 4-a cirkulero estis sendita :

« Fine ni akordiĝis laŭ la jenaj kondiĉoj : kontanta pago : 2.000.000 frankoj, la cetero estas pagota plej malfrue la 30-an de decembro (1.000.000). Aldoniĝas la maklera procentaĵo kaj la impostoj. Antaŭ du tagoj mi eksciis ke la posedantino konsentas pri la aranĝo. Mi kalkulas pri la promeso de UFE por la finnovembra pago. Mi esperas, ke mi povos pagi la saldon fine de decembro per la 262.000 frankoj, kiuj restas en nia kaso kaj la mono promesita de diversaj amikoj. Restos pagotaj la maklera procentaĵo kaj la impostoj je la fino de januaro (700.000 fr.). Estas necese ke freŝa mono venu. Agu ĉe la lokaj grupoj. Ni havas gravan respondecon. Sed ni havas belan bienon sensimilan en la esperantista mondo... »

Kelkajn tagojn antaŭ la 30-a de novembro Micard estis telefone informita, ke UFE ne plu povas doni la promesitan sumon. La respondon de Micard ne estas dece tradukebla. Nova sendorma nokto, sed la postan tagon venis la informo ke tamen UFE povos pagi.

En januaro 1952, post novaj petoj kaj klopodoj, la kastelo fariĝis posedaĵo de la Asocio sed restis mono nenie. La ĉekkontoj de Ges-roj Micard kaj de pluraj amikoj estis absolute malplenaj.

Sekvota

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso en Stokolmo :

— La alta protektanto de la kongreso (2-8 — 9-8 1980) estos S-ro Ingernund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento.

— En Stokolmo elektiĝos novaj komitato, estraro, kaj prezidanto de U.E.A...

— Krom la antaŭkongresaj aranĝoj en Svedio mem, estas preparataj antaŭkongreso en la pola urbo Gdansk (27-7 — 1-8) kaj tritaga postkongreso en Oslo (10 — 12-8).

— Ni memorigas pri la junulara kongreso de T.E.J.O. en Rauma (Finnlando) de la 25a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto. Krome, la internacia kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos de la 9a ĝis la 16a de Aŭgusto en Bosön, je kelkaj kilometroj de Stokolmo. Ĝi traktos la solidarecon kun blinduloj en evolulandoj.

— Dum la universala kongreso, okazos Internacia Infana Kongreseto en Elvskogen (Elfarbaro), je 30 km for de Stokolmo. (por infanoj ĝis 13 jaraj).

— La ĉefa temo de la kongreso de Stokolmo estos « Diskriminacio ». Aparte grandan atenton ricevos kvar specoj de diskriminacio : rasaj, kontraŭvirinaj, ekonomiaj kaj etnaj.

— Tuttaga seminario dum ekskurso per ŝipo al la insulo Aaland temos pri : « Esperanto kaj enŝtataj etnaj lingvoj ».

La S.A.T.-kongreso en Rijeka :

— La S.A.T.-kongreso okazos en Rijeka (Jugoslavio) de la 19a ĝis la 25a de Julio 1980.

— Ekskursoj kaj postkongreso estas antaŭvidataj.

— La organizantoj petas helpon por organizi ekspozicion por montri al vasta publiko la valoron de Esperanto en laboristaj medioj.

Esperanto, ankaŭ oficiala lingvo en la kibernetika kongreso :

Dum Januaro, la estraro de Internacia Asocio de Kibernetiko decidis ke, en la 9a kongreso pri kibernetiko en Namur (Belgio), de la 8a ĝis la 13a de septembro, estos tri laborlingvoj samrangaj : Esperanto, Angla kaj Franca lingvoj.

Okazos speciala simpozio pri lingvokibernetiko en kunlaboro kun la esperantistoj de Eŭropa Klubo (Kleinenberger weg 16B D-4790 Paderborn, FR Germanio).

Tiu klubo organizos ankaŭ somerajn universitatajn semajnojn en Primoŝten (Jugoslavio) de la 12a ĝis la 25a de Julio, kun altnivela programo.

Interlingvistika konferenco en Germanio :

De la 21a ĝis la 26a de Novembro 1979, okazis en Paderborn (FR Germanio), la 4a interlingvistika laborkonferenco, organizita de la Instituto pri kibertenika pedagogio. La oficialaj lingvoj estis la germana kaj Esperanto. Partoprenis ĉirkaŭ 100 personoj el 13 landoj. La konferenco havis tri kadrotemojn : nuntempaj tendencoj en la interlingvistiko, aŭtomata lingvoprilaborado, frua fremdlingvo-instruado.

Okaze de tiu konferenco, neesperantistaj partoprenantoj malkovris ke Esperanto funkcias !

Eble estas utile memorigi la difinon de « Interlingvistiko » : « Scienco kiu esploras la kondiĉojn sociologiajn, kulturajn kaj lingvistikajn de komuna normalingvo, uzota en la internaciaj rilatoj » (P.I.V., p. 641).

En Sovet-Unio :

— Dum pasintjara Novembro, okazis en Vilnius (Litova Respubliko) fonda konferenco de la litova filio de Asocio de Sovetaj Esperantistoj. Partoprenis 126 delegitoj el 26 lokoj.

La prezidanto fariĝis A.L. Skupas, ĉefo de la filologia katedro en la universitato de Vilnius, kie li gvidas kurson.

— Jam de tri jaroj funkcias en la universitato de Ufa (Baŝkirio) lektorato de Esperanto, kies lektoro estas Boris Kolker, ankaŭ aŭtoro de lernolibro.

— D-ro A.N. Bogdanov, el Kiev, organizis esperantorondon ĉe la Ukrajna Akademio de Sicencoj.

Ĉu eldona rekordo ?

En du jaroj, Hungara Esperanto-Asocio eldonis 23 librojn en Esperanto, inter kiuj 13 originale verkitaj en la internacia lingvo. Tio reprezentas 4000 paĝojn kaj 77000 ekzemplerojn.

Renkonto en Nederlando :

Internacia Esperanto-Feriosemajno, Krommenie, 10 — 17a de Aŭgusto. Adreso : T. Th. Fischer, Gagarinstraat 104, NL 1562 TD Krommenie, Nederlando.

Nova grava revuo :

Komencis aperi dum Januaro nova interesa magazino sendependa nomata « Monato ». En tiu nova ilustrita revuo (40 paĝa), principe ne aperas artikolojn pri Esperanto, sed pri ĉiuj landoj kaj pri ĉiuj kampoj de nia moderna vivo kaj nuna mondo. Grandparte, la tekstoj estas redaktitaj de esperantistoj de la koncernataj landoj mem.

La jarabono estas 52,50 gld. Adreso : TK Stafeto, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio. Vi povas peti provekzemplerojn kontraŭ du internaciaj respondkuponoj.

Propono de U.E.A.-T.E.J.O. al gejunuloj :

De nun, ĉiu tutnova membro de T.E.J.O.-U.E.A. inter 10 kaj 18 jaroj ricevos aŭtomate dujaran membrecon kontraŭ pago de 1-jara kotizo. La nura postulo estas ke, kun la aliĝo, oni informu pri la preciza naskiĝdato.

Krom la gazetoj « Koncize » kaj Kontakto », ĉiu juna membro ricevas la jarlibron de U.E.A., aŭ plie, « Esperanto » se li (aŭ ŝi) estas membro abonanto de U.E.A.

OMAĜE AL ELOI MOTILLON

« Kulturaj Kajeroj » perdis tre fidelan kaj elstaran kunlaboranton, kiam, la 28an de Januaro 1980, forpasis Eloi Motillon. La revuo ege multe ŝuldas al lia grandega kulturo. La redakcia komitato decidis omaĝi al li aperigante hodiaŭ artikolon kiun li skribis por la numeroj 3 kaj 4-5 (1967) de « Kulturaj Kajeroj ». Tiu malnova teksto, kiun, eble, malmultaj el niaj nunaj legantoj posedas, bone reprezentas lian klaran stilon, kaj la karakteron de la serĉadoj kiuj okupis lian tutan vivon.

ROBERT-HOUDIN

Majstro de la Magiistoj

LA JUNULAJ JAROJ

Dum la lasta jarcento, tiu nomo : Robert-Houdin famiĝis ne nur en Francujo, sed en la tuta mondo. Tiun vastan renomon akiris unu el la plej eksterordinaraj homoj de tiu epoko. Tiam scienco kaj tekniko faris neatenditajn paŝojn antaŭen. Oni povas diri ke, estiĝis apogeo de racia rezonado aplikata al la konkero de la naturaj fortoj.

Kontraste al tiu ondo de praktika raciismo, Robert-Houdin iel konkretigis, kaj satigis tiun profundan eternan deziron de la homoj al poezio, revo, mirindeco, supernaturo, mistero.

Oni nomis lin : « sorĉisto, magiisto ». Li mem, en la intimeco, pretendis esti nur « iluziisto » aplikanta nur naturajn, fizikajn kaj psikologiajn leĝojn. Li renovigis la antikvan arton de « blanka magio ». Eĉ lia arto ricevis novan nomon — kredeble de li mem inventita — « prestidigito ».

Dum la jaro 1805a, en centra Franclando, en Blois, naskiĝis en familio de juvelistoj-horloĝistoj Johano-Eŭgeno Robert.

Lia patro edukigis lin en kolegio, kie li fariĝis elstara lernanto. Ricevinte siajn diplomojn, oni havigis al li oficon ĉe notario. Tio ja ne plaĉis al la junulo, ĉar li ĉiam revadis pri horloĝarto kaj mekaniko. Tial, li baldaŭ forlasis la notariejon kaj dungiĝis ĉe fama horloĝisto en Tours. Tie li ellernis sian metion kaj komencis studi mekanikon.

Hazarde li legis libron, kie estis priskribitaj kelkaj el la ĵonglaĵoj kaj artifikaĵoj uzitaj de la tiamaj « sorĉistoj » kaj « magiistoj », foiristaj « artistoj », kiuj vagadis de urbo al urbo.

Allogite kaj nature scivolema kaj aventurema, li decidis elstudi tiun arton de iluzio. Tiucele li vojaĝis kiel helpanto kun tiaj sorĉistoj. Tiel, li ellernis la manipuladon de malgrandaj objektoj, kaj rapide fariĝis pli lerta ol liaj instruantoj.

—o—

LA AŬTOMATOJ

Post ses monatoj, li ĉion sciis el la sekretoj de la iluziistoj. Li iris en Parizo, kie li denove profesiis kiel horloĝisto. Post kelka tempo, li edziĝis je Cecilia Houdin, filino de lia tiama mastro. Lia bopatro estis ankaŭ fervorulo pri mekaniko, kaj finance helpis sian bofilon por konstruado de aŭtomatoj.

Tiu-ĉi, aldoninte la nomon de la edzino al la sia, rapide famiĝis laŭ la nomo Robert-Houdin. Pli poste, tiu nomo estis leĝe oficialigita.

La aŭtomatoj de Robert-Houdin intrigis kaj amuzigis la tutan parizan loĝantaron. El tiuj mirindaj « kvazaŭ-homoj » ni citu : akrobatojn, klaŭnojn kiuj fumis pipon kaj ludis per ŝalmeto, k.a. La pli eksterordinara estis la « skribisto-desegnisto ». Ĝi similis viron laŭ reala grandeco, sidanta ĉe tablo sur kiu, kuŝis skribilaro kaj paperfolioj. Laŭ ordono de Robert-Houdin, ĝi prenis plumon, trempis en la inkujon, kaj skribis respondojn al ĉiaj demandoj. Fine, ĝi subskribis : « Robert-Houdin » per skribo tute simila je tiu de la mekanikisto.



Robert Houdin laŭ litografio de Léon Noël (1848) (je lia dekstra flanko, la aŭtomato : desegnista-skribisto »).

Multaj estis la aŭtomataj aparatoj konstruitaj de la juna horloĝisto. Unu eĉ, estis multope vendita. Ĝi konsistis el ordinara vekhorloĝo kun malgranda skatolo. Je la dezirita horo, la sonorilo funkciis kaj, samtempe, eliris el la skatolo flamanta kandelo. Ĝi estis nomita la « vekilo-fajrilo ».

—o—

LA FANTASTAJ VESPEROJ DE PALAIS ROYAL

Tia estis la nomo de la spektaklo, kiun Robert-Houdin prezentis en propra teatro, kiun li instalis en « Palais-Royal » (Reĝa Palaco). Tiam — li estis 40-jara — li realigis longe prirevitan projekton. Dum tiuj « fantastaj vesperoj » estis montritaj aŭtomatoj, klasikaj sorĉaĵoj, kaj eksperimentoj vere eksterordinaraj.

La spektaklo estis belega, arta, ne nur pro la « mistero », sed ankaŭ pro la delikata gusto de la dekoracio kaj de la uzitaj aparatoj. La etoso mem estis plaĉa, agrabla. La iluziisto tute renovigis la malnovan arton trompi la publikon.

For la scenejon supermeblitan de tabloj kaj tabletoj malaperantaj sub ĝisteraj tapiŝoj ! For la arkaikajn figurojn de lunoj, steloj, sunoj ! For la strangajn bestojn, similaj je drakoj, krokodiloj, k.t.p. ! Nun la magiisto aktoras en bela salono laŭ stilo « Louis XV », blanka kaj ora ; nur unu granda tablo, du tabletoj kaj du konzoloj, ĉiuj sen tapiŝoj.

For ankaŭ la tremetantajn lumojn de kandeloj duonkaŝitaj kaj lasantaj duonombron sur la scenejo ! Helaj lampoj plene lumigas la blankan salonon.

La sorĉisto ne plu estas vestita per longa nigra robo stelumita ; li ne plu suportas altan pintan ĉapelon kun duonlunoj kaj hometoj. Robert-Houdin aperas en eleganta lastmoda frako, vera « monduma homo ». Li ja estas bela, impresiga viro kun dominantaj kaj magnetaj okuloj, kun afabla kaj persvada voĉo. Li alparolas la ĉeestantaron per flua, senerara, belstila parolo kaj asertas, ke li posedas supernaturajn kapablojn. Oni ja scias, ke lia spektaklo konsistos nur el lertaj artifikaĵoj, sed oni fariĝas komplezaj komplicoj de la iluziisto.

Tiuj linioj el grava pariza tagĵurnalo montras la entuziasmon naskitan de la nova spektaklo :

« En la galerio de Valois, en Palais-Royal, estas unu sorĉisto... La sorĉisto nomiĝas Robert-Houdin... vera sorĉisto, reala sorĉanto, garantiita kaj kontrolita, kiu faras miraklojn videblajn per viaj okuloj ».

—o—

SCIENCO HELPAS MAGION

Kompreneble, multaj el tiuj « mirakloj » estis nur artifikaĵoj, « trukoj » kiel oni diras en la teatra kaj kinematografa lingvo. Sed ili postulas eksterordinaran manlertecon akireblan nur per longa trejnado.

Unu el la fundamentaj sekretoj de la prestidigigita arto estas « enpolmado », t.e. kaŝi en la mankavo, en la polmo, malgrandajn objektojn. Kia estu la pozicio de la mano, la publiko tute ne povas vidi la enpolmitaĵon.

Ankaŭ, iluziisto uzas potencan psikologian rimedon : sugestio. Robert-Houdin posedis realan prestiĝon kaj havis superan sugestian kapablon.

Sed lia granda supereco super la aliaj magiistoj fontis el lia klereco, kaj el racia, scienca aplikado de naturaj leĝoj. Elektra scienco estis apenaŭ naskiĝinta, kaj fakte tute ignorita de nesciencistoj. Robert-Houdin majstre uzis tiun novan energion. Ne jam ekzistis elektraj centraloj, kaj li mem produktis elektron per piloj, kaj baterioj, kiujn li mem konstruis. La necesaj dratoj estis facile kaŝeblaj.

Unu el liaj plej famaj eksperimentoj estis la « mistera kesto ». Ĝi estis malgranda fera kesto. Per gestoj de sia « magia vergeto », li ĝin igis tiom peza, ke neniu persono, kiom fortika li estu, povis ĝin levi el la sojlo. Temis nur pri tiam tute ne konata afero :

elektro-magneto. Helpanto en la kuliso ŝaltis aŭ malŝaltis la kurenton laŭ ordono de la sorĉisto.

Aliaj artifikaĵoj estis nur lertaj mekanikaĵoj. Tia estis lia eksperimento pri « anestezio ». Oni ĵus malkovris la anestezian povon de etero... Li flarigis flakonon (malplenan) al sia fileto. Etera odoro estis flarebla de la publiko. La infano endormiĝis kaj ŝvebis en la aero. Oni retrovis la desegnojn de la aparato uzita, kiu estis kaŝita sub la vestoj de la knabo.

Tiel, kombinante supernormalan man- kaj fingro-lertecon, mekanikon, elektron, psikologion, Robert-Houdin faris nekompreneblajn miraklojn.

—o—

KLARVIDECO

Plej sensaciaj kaj nekompreneblaj estis liaj eksperimentoj pri « klarvideco ». Li blindigis sian 12-jaran filon per dika bendo. Poste, li petis iun objekton de la spektantoj, kaj la infano priskribis la objekton. Tio estis farita milojn da fojoj, kaj ĉiam sukcesis. Montrita antaŭ la reĝino de Britujo, Victoria, kaj antaŭ la imperiestro Napoleono III, neniam la knabo eraris malgraŭ la kaptiloj provitaj kontraŭ li de la korteganoj.

Demandite, Robert-Houdin respondis kun sekreta rideto : « Mi iel korespondas kun la knabo ». Li tamen diris, ke li kaj lia filo longe trejnadis sin per tio, kion li nomis « percepto per aprezo » ; t.e. per sola ekrigardo vidi kaj detale memori multajn objektojn (ekzemple en vitrino de magazeno). Multaj magiistoj, por eksperimentoj de « transsendo de penso » uzas kodon, simplan laŭ principo sed komplikan laŭ praktiko. Kiam la artisto parolas al la publiko aŭ al sia helpanto, la vortordo de la demandoj, akcentado de iu aŭ alia vorto havas specialan signifon ; tiel, oni atingas mirigajn efektojn. Sed, eraroj estas neeviteblaj, ĉar la eblecoj estas limigitaj malgraŭ la amplekso de tiu kodo.

Nu, nemiam la filo de Robert-Houdin eraris ; kaj neniam la patro faris publike tian eksperimenton kun alia persono. Ĉu telepatio ? Eble, la nova scienco « metapsikologio » povas iam doni sciencan respondon al tiu nesolvita demando.

o0o

NEVERŜAJNA EKSPERIMENTO

Drasta ekzemplo de la majstreco de Robert-Houdin estas la eksperimento, kiun li faris antaŭ la franca reĝo Louis-Philippe (Ludoviko-Filipo) kaj ties familio.

Petinte naztukon de ses el la ĉeestantoj, li faris pakaĵeton el ili. Li poste disdonis kartetojn, por ke ĉiu skribu lokon kie li deziru ke la paketo estu magie transportita. Kaj li petis de la reĝo, ke li hazarde prenu tri el la kartoj, kaj elektu unu el ili. Per sia magia povo, la sorĉisto sendos la poŝtukojn en la indikitan lokon. Tiu loko estis unu el la kestoj, kie kreskas oranĝarboj lokitaj en apuda galerio. La magiisto kovras la pakaĵeton per kristala klošo netravidebla, signas per la magia vergeto, deprenas la klošon. La poŝtukoj malaperis. En ilia loko staras turto kun rubando ĉirkaŭ la kolo. Laŭ ordono de la reĝo, oni esploras en la elektita kesto. Inter la radikoj de la oranĝarbo estis trovita rustita fera skatolo. Ĝi estis ŝlosita, sed feliĉe, ŝlosileto pendas ĉe la kolo de la turto. La reĝo malfermas la kesteton kaj trovas... pergamenon, kun la jena skribaĵo :

« Hodiaŭ 6an de junio 1786.

Tiu fera skatolo entenanta ses poŝtukojn estis lokita inter la radikoj de oranĝarbo fare de mi, Balsamo grafo de Cagliostro por utili al faro de magia ago, kiu estos farata post sesdek jaroj ekde tiu tago, antaŭ Louis-Philippe d'Orléans kaj lia familio. »

Aŭtentigis la skribaĵon la subskribo kaj la sigelo de Cagliostro. Sub la pergameno kuŝis la paketo de poŝtukoj sigelita de la sama sigelo !

Sendube, tiu nekredebla magiaĵo estis zorge antaŭpreparita de Robert-Houdin. Sed kiel kaj kiam la sorĉisto povis enmeti la skatolon sub la oranĝarbo ? Ĉu li havis helpanton ? Plie, oni povas konjekti ke, la sorĉisto lerte ŝanĝis unu el la kartoj. Ĉu la reĝo ne konis la skribmanieron de siaj familianoj ? Kial, li precize elektis la karton preparitan de la magiisto ? Ĉu tiu-ĉi sugestiis la reĝon ? Kial, ĉiuj ĉeestantoj — ne eĉ la reĝo — ne konsideris la leteron de Cagliostro kiel mistifikaĵon (kio ĝi ja estis) ? Nesolveblaj demandoj, ĉar Robert-Houdin neniam rivelis la sekreton.

o0o

GLORO KAJ RIPOZO

En Francujo, la politika situacio fariĝis malfacila, kaj fine, en 1848, eksplodis la revolucio. Kompreneble, tio malplenigis la teatron. Tial, Robert-Houdin akceptis inviton iri en Anglujon. Tie, li ricevis sukceson eĉ pli grandan ol en sia lando. Li estis petata prezenti sian spektaklon antaŭ reĝino Victoria. Ĉeestis, krom la reĝino kaj la tuta brita nobelaro, alilandaj princoj. Inter ili estis la estonta imperiestro Napoleono III. En siaj memoraĵoj, la magiisto lirike priskribis tiun eventon. Poste li faris triumfan vojaĝon tra Britujo.

Reveninte Francujon, Robert-Houdin retrovas la saman sukceson kiel antaŭe. Sed nun, li bezonas ripozon ; li estos baldaŭ 50-jara ; la strečа ĉiutaga laboro fariĝas laciga. Kaj estas jam tempo realigi la jam longe aspiritan deziron : dediĉi sian tutan tempon al siaj ŝatataj studoj pri elektro kaj oftalmologio.

Fine, en 1852, vendinte sian teatron al sia bofrato, li retiriĝas en bieno nomita « la Priorejo », en Saint-Gervais, vilaĝo proksime de Blois, lia naskiĝurbo.

La Priorejo rapide akiris reputacion de « ensorĉita domo ». Kiam oni frapis eĉ la enireja krado, ĝi malfermiĝis tute sola, sonorilo buris en la domo en la fundo de l' parko, ĝis la fermo de la pordo. Se la poŝtisto ensovis korespondaĵon en la leterkeston, avertilo funkciis en la domo. Multaj aliaj strangaĵoj okazis en la bieno.

Krom tiuj amuzaj, foje mistifikaj aplikoj de elektra forto, Robert-Houdin serioze laboris. Li ricevis premiojn

pro diversaj inventaĵoj okaze de la Universala Ekspozicio en 1865. Li konstruis la unuan elektran distribuilon. En 1863, okaze de familia festo, li lumigis la salonon kaj la parkon per elektraj lampoj kun vegeta fadeneto (kredeble el kano). Do, antaŭ Edison, li trovis solvon por la inkandeskaj lampoj. Ankaŭ li faris la unuan elektran brustumon por skermistoj. En 1867, li prezentis al la Internacia Kongreso pri oftalmologio aparatojn, kiuj estas la pratipoj de tiuj nun uzataj.

o0o

JE LA SERVO DE SIA LANDO

Tiu laborema kaj fruktodona ripozo estis interrompita dum kelkaj monatoj laŭ tute ne atendita maniero.

La franca registaro petis lian helpon por la pacigo de Alĝerio. Kiom eksterordinara kaj stranga tio povas aperi, ĝi okazis kaj plene sukcesis. En siaj memoraĵoj, Robert-Houdin klarigis la naturon de la misio, kiun li akceptis :

« Oni ja scias, ke la plej granda nombro de ribeloj, kiujn oni devis haltigi en Alĝerio estis instigitaj de intrigantoj, kiuj diris ke ili estas inspiritaj de la Profeto... Nu, tiuj falsaj profetoj, tiuj sanktaj marabutoj, kiuj, fakte, ne estas pli sorĉistoj ol mi — eĉ ili estas tio malpli ol mi — tamen sukcesas ekflamigi la fanakitismon de siaj samreligianoj per ĵonglaĵoj tiel primitivaj kiel spektantoj antaŭ kiuj ili estas prezentataj... Oni esperis, prave, komprenigi al la Araboj, helpe de miaj spektakloj, ke la artifikaĵoj de iliaj marabutoj estas nur infanaĵoj kaj ne plu povas, pro sia naiveco, prezenti miraklojn de la Plejaltulo... »

La franca magiisto do akceptis la taskon kaj, en septembro 1856, alvenis en la ĉefurbo, Alĝero, okaze de grandaj festoj organizitaj de la franca registaro. Kaj il mirinde plenumis sian mision.


La neelĉerpebla botelo disdonis bonegan kafon kaj teon kun mento. Atletoj senfortiĝis laŭ la volo de la franca sorĉisto kaj fariĝis malkapablaj suprenlevi la misteran kesteton. Arabo, kiu konsentis grimpi sur la scenejon subite malaperis, kaj estis retrovita sur la perono de la teatro, konfuzega, neniel komprenante kio okazis al li. Floroj, bukedoj, girlandoj aperis subite, ŝvebis en la aero...

La pli impresiga eksperimento ja estis la pruvo de la nevundebleco de Robert-Houdin. Iu araba sorĉisto minacis al li, kriante : « Mi cin mortigos » La Franco venigis lin sur la scenejon, donis al li militistan revolveron kaj petis de la Arabo, ke li mem ŝarĝu la armilon, markinte sur la plumba kuglo ian signon per sia tranĉilo. Poste, la magiistro staris je ĉirkaŭ du metroj de sia « mortigonto » kaj diris al li : « Pafu ! ». La Arabo pafis. La franco ne estis vundita, kvankam sendube trafita, ĉar la kuglo aperis inter liaj dentoj. La pafinto mirege konstatis, ke tiu kuglo estis tiu mem, kiun li markis ! Kviete, Robert-Houdin diras : « Se mi volus, mi cin mortigus. Rigardu ! » Li pafas al la blanka muro. La kuglo trafas, kaj sanga makulo aperas. La Arabo, per la fingro prenas iom el tiu sango, gustumas kaj konfesas : « Ĝi certe estas homa sango ! Ci estas vera sorĉisto ! »

Robert Houdin eksplikis la artifikaĵon. Ĝi ja tute ne estas mistera ; sed ĝi postulis tiom da genia imago, da supera lerteco, ke estas dubeble ĉu iu el niaj modernaj magiistoj povus ĝin fari kun plena sukceso.

Oni povas imagi kian teruron sentis la Araboj pro tiaj sorĉaĵoj ! Sed la interpretistoj estis ordonitaj diskonigi, ke la mirakloj de la franca magiisto estas nur artifikaĵoj, rezultoj de arto nomita « prestidigito », kaj tiel, pruvi ke la sanktaj marabutoj estas nur ĵonglistoj kaj trompistoj.

Kreskis admiro kaj respekto al la Francoj. La tuta prestiĝo de la arabaj sorĉistoj disfalis. La franca supereco agnoskita kaj akceptita, la ribeloj ĉesis. Tiel ekregis paco, multe da verŝota sango estis domaĝita, kaj elradikiĝis potencaj superstiĉoj.



Omaĝo de la Araboj tribestroj al Robert-Houdin (oktobro 1856)

GENIA ILUZIISTO, SCIENCISTO, PATRIOTO

Per tiuj tri nomoj oni povas karakterizi tiun eksterordinaran viron, Robert-Houdin. Vere stranga homo li estis kiu, per samegalaj imago kaj lerteco kunigis du ekstremojn ; artisma mistifikado kaj pionireco de vera sciencisto. Jam nejuna, pli ol 50-jara, li konsentis rompi sian ripozon, interrompi siajn ŝatatajn studojn, entrepreni lacigan vojaĝon por helpi al sia patrolando : Ni menciu ankaŭ ke, Méliès la pioniro de kinematografo, kreinto de la « trukoj » kaj « specialaj efektoj » de la sepa arto, multe ŝuldis al liaj konsiloj kaj kunlaborado.

Robert-Houdin mortis en Saint-Gervais, en la jaro 1871a, estante 66-jara.

E. MOTILLON.

PRI NOD-ARTO " MACRAME "

(pr. MAKRAME)

Ĉiujare, la somer-programo de la Esperantista Kulturdomo Gresillon proponas al siaj staĝanoj, flanke de Esperanto-aktivaĵoj (kursoj, prelegoj, diskutoj) ankaŭ manlaborojn, ĉu por ripozigi iliajn cerbojn, ĉu por allogi komencantojn kiuj tiamaniere povas familiariĝi kun praktika vortaro okaze de komunaj, senĝenaj baliladoj rilatantaj al la manfaradoj... kaj, kia bona okazo lerni novaĵon kaj kunporti al parencoj aŭ amikoj siajn proprajn faraĵojn ; korbojn, perl-juvelojn, binditajn librojn, art-fotografaĵojn, « makrame » -akcesoraĵojn, ĉefe mansakojn !

Kio estas « makrame » ? Al tiuj, kiuj ne ankoraŭ scipovas, mi asertas : Tre simpla arto kiu postulas nur ŝnur-fadenojn kaj man-lertecon por nodi ilin, ie ajn.

Laŭdire, al ni ĝi venis el Arabaj landoj ekde la 13-a jarcento. La vorto mem verŝajne devenas de arabaj vortoj, ĉu de « migramach » : ornamaj plektaĵoj, ĉu de « macrame » : tuko ornamita de noditaj franĝoj, kaj uzita kiel kapbendo. Hispanoj, kiuj lernis tiun arton de la Maŭroj, ĉefe uzis ĝin por dekoracii sacerdotajn vestojn kaj akcesoraĵojn antaŭ disvastiĝo en sudo de Eŭropo ĝis Flandrioj. Jam de la 16-a jaro, oni trovas la vorton « macrame » en la itala lingvo por nomi manviŝtukojn ornamatajn ĉe ambaŭ ekstremaĵoj de longaj noditaj franĝoj, ili mem nomitaj « makrame », kiel aliaj noditaj art-ŝnuraĵoj.

Sed, nedube, ankoraŭ pli malnovaj civilizacioj konis kaj uzis la nod-arton por fabriki ilojn, dekoracii ŝtofojn, eĉ fari ritajn maskojn kiel en Afrikaj gentoj aŭ ŝal-franĝojn en Malnova Meksikio. Nodoj el ledo, lino, aŭ papiruso estis retrovitaj en Egiptaj tomboj kaj, sur Asiriaj bareliefoj, oni vidas longajn procesiojn da pastroj kaj korteganoj kun vestoj ornamitaj de franĝoj. Nekontesteble, do, « makrame » havas tre antikvajn devenojn kaj oni povas, plue, rimarkigi ke tiu nodarto havis, en la pratempoj, ne nur praktikan uzon sed ankaŭ simbolan. Fakte, en malnovaj civilizacioj, kiel tiu de la Inkaoj en Peruo, kiuj ne ankoraŭ uzis skribon, de la ĉinoj antaŭ la invento de ideogramoj, homoj interŝanĝis mesaĝojn sub formoj de ŝnuretoj diversmaniere kunligitaj. En malnova Japanujo estis eble rekoni la socian situacion de individuo pere de la nod-tipoj almetitaj al la vestoj.

El tio oni povas dedukti, ke estetika kaj simbola uzo de nodoj kaj franĝoj ĉe plej antikvaj popoloj iom post iom disvolviĝis al vera tekniko kun tre precizaj reguloj : Reguloj aplikataj al modernaj art-dekoraĵoj aŭ utilaj akcesoraĵoj. Laŭ la materialo uzata : dika ŝnuro el kanabo, aŭ sisalo, fadenoj el silko, kotono... aŭ plasto, « makrame » povas transformi ilin en hamakojn, sakojn, zonojn, pendigilojn, kurtenojn kaj panelojn, delikatajn puntojn, ktp.

Oni povas aldoni, ke ne nur inoj sed ankaŭ viroj, plezure, povas praktiki tiun arton ! Ĉu, jam de multaj jarcentoj, tion ne pruvis tutmondaj maristoj kiuj, tutcerte, multe kontribuis al diskonigado de « makrame » ? Ja, tiuj-ĉi kiuj trapasis tutan labor-vivon en fiksado de ŝtokoj kaj kabloj, en interplektadoj de ŝnuroj donis nomojn al nekalkulebla nombro de nodoj. Ne imagebla estis la kreema imagpovo de ili alportita al nodarto kiu samtempe estis por ili distro kaj kroma perlaboro. Fakte, dum longaj marveturadoj ili fabrikis, pere de la disponeblaj ŝnuroj, utilajn objektojn aŭ dekoraĵojn ne nur por utili en la ŝipo mem, ankaŭ kiel varinterŝanĝoj kiam en fremdaj landoj.

Kompilis B. Cheverry.

LA ATLANTIKA DORSALO

De kvindeko da jaroj, la oceanografiistoj precizigas la ĉeeston de submara monto-ĉeno, kiu etendiĝas, laŭ preskaŭ 20.000 km, de la Arkta Oceano ĝis la Antarkta Oceano ; preskaŭ paralele al la sudaj kaj nordaj amerikaj, afrikaj kaj eŭropaj marbordoj. La kelkaj punktoj de tiu Atlantika-Dorsalo, kiuj elmergiĝas, formas la insulojn Bouvet, Gough, Tristan da Cunha, St-Helene, Ascension, St-Paul, la Açoroj, Islando kaj Jan Mayen ; ĉiuj estas vulkanaj insuloj.

En Islando, tiu Dorsalo alidirektiĝas : de sudokcidente- nordorienten, ĝi direktiĝas sud-norden ; estas en la centro de la insulo, en la loko mem, kie troviĝas la aktivaj vulkanoj, la freŝdataj erupcioj ; estas la Eldgja, la Fendo de la Fajro, proksimume 30-km-longa, 600 m-larĝa kaj 140 m-profunda.

En 1938 germana ekspedicio notis, en tiu ĉi Fajro-Fendo, drivadon de la Tera Krusto, de preskaŭ 3,6 mm pojare. La observadoj de tiuj 20 lastaj jaroj konkludis, kiel Wegener en 1937, ke, antaŭ 200 milionoj da jaroj, la kontinentoj Ameriko kaj Eŭropo-Afriko kunligiĝis kaj formis unu nuran blokon ; tiam Brazilo estis en la Nigeria golfo kaj Novtero algluiĝis al la okcidenta Iberia bordo.

La Tera Krusto rompiĝis laŭ pluraj etapoj.

La unua rompiĝo de tiu enorma bloko estus okazinta, antaŭ 180 milionoj da jaroj, inter Afriko kaj Nordameriko (laŭ la linio : Novtero, Acoroj, Gibraltar) kaj en la ekvatoria regiono (inter Usono kaj la Afrika bloko). Antaŭ 130 milionoj da jaroj, la fendo pli longiĝis norden en Labrador-regiono, kaj suden inter Afriko kaj Sudameriko. Antaŭ 80 milionoj da jaroj, Nordameriko kaj Eŭropo disiĝas ; la Gasgonuja golfo malfermiĝas kaj la Iberia duoninsulo glitas suden. Antaŭ 50 milionoj da jaroj, okazas aperturo inter Groenlando kaj Skandinavio. Poste aperas la Norveguja maro.

La Atlantika Dorsalo okupas ĉirkaŭ unu trionon de Atlantiko, en ĝia mezo. Unu mediana valo, la « Rift-o », insertiĝas laŭlonge de tiu monta ĉeno ; ĝi estas proksimume 2 km-profunda, kaj 30 km-larĝa ; ĝi estas sidejo de senĉesaj vulkanaj erupcioj : la bazaltaj rokoj elĵetitaj ambaŭ-flanken de la fendo, laŭ paralelaj ŝtuparoj, glitas al la bordoj, kiel sur rultapiŝo. Tiu renovigado de la Dorsala Krusto varias de malpli ol unu centimetro ĝis 8 centimetroj pojare ; tio donas totalan interspacon 16-centimetran pojare, kiam la translokiĝo estas rapida.

Estas la Drivado de la kontinentoj.

LA UNUAJ LUDOJ EN OLIMPIO

Honore al Hera, jam ekzistis, en -500, Ludoj el Kreta origino. Ilin frekventis junulinoj el Elis, la najbara urbo. Kun haroj malnoditaj, kun tuniko mallonga, ĝis super la genuoj, kun la dekstraj ŝultro kaj mamo nudaj, ili partoprenis pied-kuradon. Ili celis iĝi Pastrinoj de Hera, Pastrinoj de Luno. Tio ĉi okazis en la monato Partheos (de la junulinoj) kaj sendube ĉiun jaron. La venkanta junulino ricevis kronon el sovaĝa olivujo.



La Kuretoj (la Kouroi), kiuj protektis la bebon Ze**ŭ**so, estis Kretanoj. Ili estis 5 fratoj ; la plej aĝa nomiĝis Heraklo (estas titolo, kiu signifas « je la gloro de Hera » — li antaŭis tiun de la 12-Laboroj). Ili organizis sportajn konkuradojn ; aliaj junuloj ilin partoprenis. La venkanto ege deziris iĝi la Edzo de la Diino, la Sankta Reĝo, promesita al senmorteco.

Plutarko diris, ke — kvankam la piedkurado estis la nura provo de tiuj Ludoj en Olimpio — en la komenco, ili finiĝis per duelo ĝis morto de la venkito.

La Dioj kaj la Reĝoj ilin partoprenis : Ze**ŭ**so kontraŭ Krono ; Apolono, kiu venkis Areson en pugnobatalo kaj Hermeson en piedkurado. La unua reĝo de Elis estis devigata cedi sian tronon al Endimiono.

Tiuj Ludoj okazis honore al Mortinta Heroo ; ili lin gloris ĉiun jaron por ke, en Transmondo, li ne perdu sian potencon. Estis ankaŭ turniro por konkeri la estrecon : eterna batalo en multaj primitivaj societoj, inter junuloj kaj adoltoj.

Ili ankaŭ elvokas la inicajn ritojn, kiuj igis adoleskanton adoltulo ; ina inicado kun Hera, maskla inicado kun Ze**ŭ**so.

Al la piedkurado aldoniĝis la ĉar-kurado ; ĝi simbolis la forrabon de la Diino fare de la Dio ; ĝi antaŭis la sanktan unuiĝon, kiu devis fekundi la teron kaj ĝin kovri per nova florado.

Estas en Olimpio, la ĉar-kurado de Pelops kontraŭ Oenomaos.

Pelops, filo de Hermeso, venis el la mezazia Lidio. Li volas edziĝi al Hipodamia, filino de Oenomaos, reĝo de Arkadio ; ŝi estas Pastrino de Hera. Oenomaos jam mortigis, en ĉar-konkuradoj, plurajn staviĝantojn, plurajn sanktajn reĝojn.

Pelops organizas la akcidenton de ĉaro, kiu mortigos Oenomaos. Tiu rita ĉar-akcidento estis arangita ĉiun jaron : oni forprenis la stifton de la radakso kaj ĝin anstataŭigis per vakso. La ĉevaloj estis furiozigitaj per ekscitiloj kaj per la marmora statuo, kiu staris ĉe la ĝirejo. La maljuna reĝo mortis kaj la juna prenis la tronon kaj la pastrinon. La kurso iris de Olimpio ĝis la istmo de Korinto (samaj ĉar-kuradoj, samaj akcidentoj okazis en la Istmaj Ludoj). En Olimpio, oni starigis altarojn por Pelops, Oenomaos kaj Hipodamio. Ili estis ritaj roluloj.

La mito de Ganimedo.

La laŭdira forrabo de Ganimedo, fare de Ze**ŭ**so-aglo, trovis sian originon en pentraĵo, farita sur vazo kun nigraj figuroj. Reale, diras S-ro Graves, ĝi reprezentas la kronadon de Sankta Reĝo, anstataŭanto de Ze**ŭ**so mem, kaj aliancigita al la Diino. La aglo kiu falegas sur lin, donas al li diecon kaj senmortecon. Same, la falko malsuprenvenas sur la Faraonon en la momento de lia kronado. La juneco de Ganimedo montras, ke li estis tiu anstataŭanto, kiu reĝis nur unu tagon. La aglo de Ze**ŭ**so investis al li ne nur reĝecon sed la tujan eniron de Ganimedo ĉe la Olimpanojn. La pokalo, kiun li tenas, enhavas, laŭ la kutima funebra rito, la oferverŝon faritan honore al sia reĝa antaŭulo.

La leviĝo al la cielo sur la dorso de aglo aŭ sub formo de aglo, estis religia fantaziaĵo tre diskonita. Aristofano, en sia verko, La Paco, faris pri tiu temo karikaturon : lia heroo leviĝis al la ĉielo sur la dorso de skarabo. Tiu mito ekzistas en aliaj tradicioj :

(La animo de la Kelta heroo Lugh forflugas al la ĉielo sub formo de aglo, post kiam lia Alter Ego mortigis lin meze de somero. — Etana, la babilona heroo leviĝas al la ĉielaj palacoj de Iŝtar sur la dorso de aglo post lia edziĝo al Kish ; lia falo estas puno pro la malbonaj rikoltoj de lia reĝado — Same por Ikaro : por komenci la Novan Palestinan Jaron, oni brulis en la printempa ĝoj-fajro, la Anstataŭanton de Suno-Reĝo, al kiu oni estis fiksinta aglajn flugilojn).

La konstelacio Amforo, identigita al Ganimedo, origine estis la egipta dio de la Nilo-fontoj ; li verŝis akvon. Ganimedo verŝis la oran medon, kiu akompanis ambrozion ; tiu ĉi estis kaĉo el hordeo, oleo kaj hakitaj fruktoj, kiun frandis la reĝoj kaj la dioj, dum iliaj regnanoj, pli malriĉaj, nutriĝis je asfodeloj, malvoj kaj glanoj.

La mito Ze**ŭ**so-Ganimedo estis populara ; ĝi estis la religia pravigo de la pasia amo de matura homo por junulo. En ekstrema formo, la kulto al la Diino kondukis ŝiajn adorantojn al mem-kastrado ; ili surmetis inajn vestojn. Tial la sodomistaj pastroj estis akceptitaj en la Templo de la Granda Diino en Tyr, en Joppe (antikva Jaffa) Hierapolis, kaj Jerusalem (antaŭ la Ekzilo). Tiu

nova pasio (kiun Apolono kaj Thamys konkurence sentis por Hiacintos sparta princo), montris venkon de Patriarkeco super Matriarkeco.

Ĝi estas esprimita en la verko de Platono, kiu uzis la miton de Ganimedo por pravigi siajn proprajn sentojn kontraŭ disĉiploj (Phedon). Tamen, alie (Leĝoj) li kondamnas la sodomismon kaj diras, ke la sento de Zeŭso por Ganimedo estas « perfida Kreta inventaĵo ». Laŭmezure, ke la filozofio de Platano diskoniĝis, la grekaj virinoj kiuj, ĝis tiam, konstituis la intelektan superan klason, degeneris kaj iĝis laboristinoj ne pagitaj, kiuj fabrikis infanojn ; dume Zeŭso kaj Apolono estis la regantaj Dioj.

La Ribelo de la Gigantoj.

Tamen, longtempe, Rhea kaj Hera rifuzis al Zeŭso la superrigadon ; Hera starigas kontraŭ lin la Gigantojn. Estas la Gigantomakio, kiu figuras sur la frontonoj de Olimpio.

Grandegaj, teruregaj, kun hirta hararo, longa barbo, serpenta vosto, la 24 Gigantoj atakas Olimpon per rokoj, pikpioĉoj, flamantaj torĉoj. Dum la pacemaj Hestia kaj Demeter tordas al si la manojn, la sagoj de Eroso, de Hermeso, de Apolono, la torĉoj de Hekata, la ŝtonoj de Atena, la fandigita metalo de Hefeso, la klaboj de la Parkoj, la fulmo de Zeŭso, la kuraĝo kaj la forto de Heraklo dispelas la Gigantojn. Pro sia dieco, la Olimpanoj ne povas ilin mortigi. Estas Heraklo, kiu ilin postkuras kaj mortigas.

Tiu legendo bildigas la ribelon de la montaranoj de Hera kontraŭ la fortresoj de Zeŭso. Appolonios de Rhodes rakontas kiel la Gigantoj atakis la Argonaŭtojn de Mysie kaj kiamaniere la sagoj de Heraklo ilin mortigis.

Ja, Hera furiozas ; ŝi kreas Tifonon la plej teruran el la monstroj : vosto de serpento, pluraj kapoj kies okuloj ĵetas flamojn, kies buĉoj kraĉas inkandeskajn rokojn. La Dioj de Olimpo estas terurigitaj. Ili forkuras en Egiptujon, kie ili kaŝiĝas sub formo de bestoj : Zeŭso estas ŝafido, Apolono, korvo — Dionizo, kapro — Areso, apro — Hera, blanka bovidino — Artemisa, Kato — Afrodita, fiŝo — Hermeso, ibiso.

Atena mokas Zeŭson, kiu fine kuraĝe vundas Tifonon per sia ŝtona falĉileto, per sia fulmo. Sed Tifono estas la pli forta kaj malliberigas Zeŭson. Estas Hermeso, kiu liberigos lin. Zeŭso revenas kiel Mastro sur Olimpon kaj ĵetas Tifonon sub la monton Etna, kie ĝi ankoraŭ kraĉas.

Tifono estis, eble, la siroko, kiu blovis el la dezerto kaj ruinigis Libion kaj Grekujon. Sed, pli certe, ĝi estis la erupto, kiu malaperigis la insulon Thera en -2 000. Sendube pastroj kaj pastrinoj forsaviĝis. La forkuro Egiptujen permesis elvoki la egiptajn diojn, besto-formajn : (Tot-Hermeso-ibiso) (Irisa-Hera-bovidino) (Pasht-Artemisa-kato).

Tifono ankaŭ similas la ŝtonan Hititan Giganto Ullikummi, kiu volis detrui la ĉielajn diojn. Zeŭso estas la suna Tesup.

Alia elprovo atendis Zeŭson : La ribelo de la Olimpanoj. Hera, Pozidono, Apolono, kaj la aliaj Olimpanoj, krom Hestia, ribelas kontraŭ Zeŭso. Dum li dormas la aliaj ligas lin per ledaj rimedoj. Dum ili diskutas por scii, kiu estos la Mastro, Tetisa la Nereidino, timante palacan revolucion, malligas la nodojn kaj liberigas Zeŭson. Oni imagas lian grandan koleron ! Li sendas Apolonon kaj Pozidonon ĉe Laomedono, kie ili laboros kiel sklavoj al la konstruado de la urbo Trojo. Tiu evento verŝajne estis minaco de la vasalaj princoj kontraŭ la Alta Helena Reĝo.

Zeŭso triumfas.

Edzo de Hera, li estas la dio de la familio ; li iĝas dio de la tribo, dio de la civito, tiu de ĉiuj civitoj, tiu de ĉiuj popoloj. Mastro de Olimpo, mastro de la dia Justeco ĉe Pindaro kaj Eskilo, li iĝas Animo de la Mondo ĉe la Stoikistoj. Sed li estas nek la Patro de la dioj, ĉar li estas ilia frato, nek la Patro de homoj, kiujn kreis Promoteo.

Tamen Zeŭso konsideris sin submetita al la Destino ; ankaŭ submetita al la destino estis ĉio, kio **estas,** en la mondo, maljusta, absurda kaj nekomprenebla.

En la klasika periodo lia plej fama sanktejo estis en Olimpio.

La templo de Zeŭso.

Post la venko de Salamiso, la Grekoj decidis konstrui en Olimpio, glore al Zeŭso, kiu, ĉi tie, havis nur altaron, la plej grandan el la temploj dediĉitaj al la Mastro de la Dioj.

En la jaroj -468, -467, la arkitekto Libon estris la laborojn. La templo (64 m × 27 m × 20 m.) staris sur enorma bazamento ĉirkaŭ kiu, (pro tertremo, kiu ĝin detruis) restas nur hodiaŭ enormaj tamburoj, kiuj atestas la enormecon de la konstruaĵoj. La dorikaj kolonoj, diametraj je 2,20 m. kuŝas tere.

Por enigi la statuon de « Zeŭso Olimpano » oni devis aranĝi la templon. Tiu statuo farita de Fidio (Phidias) en la laborejo de Olimpio, samdimensia kiel la « cella » de la templo, estis unu el la Sep Mirindaĵoj de la Mondo.

La sidanta Zeŭso estis 13 m-alta. En la manoj li tenis unu « Venkon » kaj unu sceptron sur kiu staris la aglo, lia simbolo. La partoj nudaj estis el eburo ; la robo el oro kaj punktita je gemoj ; la sandaloj kaj haroj el oro ; la trono el oro, eburo, ebeno, kaj dekoraciita je riĉaj gemoj.

La Zeŭso de Fidio ne estis la terura dio, kiu punas la maljustecon ; li montriĝis dolĉa kaj plena de amo por la homoj. La poeto Filipo de Tesaloniko skribis pri tiu statuo : « Aŭ la Dio malsupreniris sur la teron por, al ci, malkovri sian vizaĝon, aŭ ci, Fidio, suprenleviĝis al la ĉielo por lin vidi ».

Specialaj pastroj, la Fedrintoj, ŝmiris, per oleo, la statuon. En la 5-a jarcento de nia erao Teodoro la 2-a, bizanca imperiestro forportis la statuon en Konstantinopolon. En 475 incendio ĝin detruis.

La altaron dediĉitan al Zeŭso konstituis la cindroj de la viktimoj buĉoferitaj sur la altaro. La amaso, knedita kun la akvoj de Alfeo, estis 7m-alta, kiam Paŭzanio vizitis Olimpion.

La muzeo entenas frontonojn kaj metopojn, vunditajn, kripligitajn : « palmetoj, ovoj, perloj, piruetoj », kapoj de leonoj, gargojloj, plafonoj skulptitaj je rozoj. Sur la frontonoj, bataloj kontraŭ la Centaŭroj, kontraŭ la Gigantoj, kontraŭ Tifono. Sur la metopoj la ĉar-kurado de Pelops kaj Oenomaos, la laboroj de Heraklo. La dioj, la herooj : Zeŭso, Apolono, Dionizo, Atena, Hera, Tezeo, Heraklo, firme, perforteme, majeste, kontraŭas la monstrojn, la Malbono-fortojn, finfine superregitaj. Nimfoj, soldatoj, infanoj junulinoj, havas sian lokon en tiuj komponaĵoj perfekte harmoniaj. Ŝajnas, ke vivanta popolo staras antaŭ ni. La akreco de la bataloj, la majesteco de la venkantoj, la malespero de la venkitoj, la fragileco de inaj vualoj, eniras en niajn okulojn ĝis fundo de nia koro.

La atletaj skulptaĵoj reprezentas la belan plastikon de la Olimpikanoj. Myron kaj Polyclete laboris en Olimpio. Polyclete difinis la matematikajn proporciojn de la ideala homa korpo. Estas lia fama « kanono ». La kanono estis bazita sur la « palmuso » ; la palmuso estas larĝa je 4 fingroj de la mano. La futo entenas 3 palmusojn ; la gambo 6, la brako 4. Tiun kanonon li enkorpigis en unu el siaj ĉefverkoj : la Lanco-portisto. Tiu kanono estis respektita dum unu jarcento ĝis Lysippe. La Lanco-portisto, la Disko-ĵetanto, la Diademo-metanto glorigis la belajn adoleskantojn, pri kiuj Sokrato kaj Platono, pli malfrue, diris, « ke ili estis speguliĝoj de la belaj animoj ».

La atleta idealo celis tiom la moralan perfektecon, kiom la fizikan.

LA HUNDO DE LA SENMORTECO

Nur la diplomitaj literaturistoj scias pri Alfred de Musset, ke li havis krom la laŭnaskiĝa senmorteco, ankaŭ oficialan senmortecon. Li ĝin ricevis de la Franca Akademio.

Nome la afero iris tre malfacile. La oficiala senmorteco neniel volis rekoni la senmortecon de la kompatinda Alfredo.

— Estu kontenta pri via propra senmorteco — flustraĉis ĉe la pordoj la pordistoj de la Olimpo. — Kiu ne respektas la personojn havantajn aŭtoritaton tiu ne volu esti inter ili.

Vere la poeto tre bone vivis dum iom da tempo sen la senmorteco kaj la plezuroj de la mortema vivo estis sufiĉaj por li. Kiam ĉi-lastaj unu post la alia forlasis lin, nur tiam sopiris Alfred de Musset pri la akademia frako. Tuj evidentiĝis, ke la akademianoj tute ne estas tiel ŝtonkoraj kiel la ĵurnalistoj distrumpetas pri ili. Post kiam ili ricevis de la kuracistoj de Musset garantion, ke la poeto estas jam duone en la sako de la diablo, kiu lin kunportos post unu-du jaroj nesaveble, tuj ili diris, ke « prenu ĝin kato », ili povos elteni tiom da tempo eĉ kun li, nu, li okupu sian lokon inter la « verdfrakuloj ».

Tamen troviĝis kelkaj obstinaj senmortuloj, kiuj ne povis pardoni al la mortmalsana poeto lian talenton. Precipe sinjoro De Saint-Aulaire intrigadis kontraŭ li kun kelkaj maljunaj kolegoj. Niatage jam ne estas scieble pri ĉi tiu sinjoro, ĉu li kulturis la literaturon de la nacia ŝafbredado aŭ ĉu li pruvis la kulturhistorian gravecon de la druidaj muŝkaptiloj trovitaj en sia bieno, nu, nur tio estas certa, ke tiutempe li estis pli granda aŭtoritato ol la malmorala poeto de « Les Nuits ».

— Ĉio dependas de li — diradis al Musset liaj amikoj kaj persvadis lin fari ĉe la grafo tiun honorviziton, kiun neniu povas eviti volante akiri ankoraŭ en sia vivo la senmortecon.

La grafo somerumadis en sia vilaĝa bieno ĉirkaŭ Parizo kaj Alfredo, kiu investis la lastajn monerojn de sia havaĵo en paradan veston, faris la tutan vojon piedire. Dumvoje al li iĝis iome varme, tamen ĉe la pordo de la kastelo frosta ŝvito trakuris lian tutan korpon. Sur la sojlo baris al li la vojon malpurega, hararaĉa hundo kolerege murmuranta. Jam delonge ĝi ne povis kuŝi en metita lito, tio tuj vidiĝis pri ĝia hararo kaj ĝi ofte renkontiĝis kun bastono, ĉar ĝi tiris post si unu el siaj malantaŭaj piedoj.

— Aĉa bestaĉo — pensis la poeto kaj li ekhavis la emon piedpuŝi la flankon de la hundo. Tamen, kiel singarda urbloĝanto, li opiniis plie ne montri siajn sincerajn sentojn prefere li tre amike eligis siblan voĉeton al la vojbaranto.

— Li povas esti honesta homo — pensis la kvarpieda aĉa hararglobo kaj ĝi ne nur lasis libera la vojon al la poeto, sed ĝi postskuris lin.

— Prefere ci estus rabiiĝinta kune kun via mastro ! — nervoze returnis sin la poeto kaj laŭ la perfidemo de la lirikistoj, li flustradis belajn ŝtrofojn al la malagrabla akompananto por gajni ĝian bonvolon.

— Nu jen — prenis por kontanta mono la hundo la flaton kaj ĝi ne estus forlasinta la poeton eĉ por la tuta mondo. Ĝi lin akompanis vostosvinge sur la aleo de ulmoj kaj kurante sekvis lin inter la globforme tonditaj buksoj kaj iris kun li supren laŭ la marmora ŝtuparo.

— Ŝajnas, ke ci apartenas al la domo — trankviliĝis la poeto kaj li flate karesis la hirtan kapon de la hundo. Kiel delikata animo, li abomenis ĉion, kio ne estas bela, sed kiel « vicomte », lia koro estis plena de komprenemo koncerne la aristokration.

— Ŝajnas, ke mi trafis en bonan societon — eklekis la hundo la manon de la poeto kaj post la malfermo de la pordo, tuj ĝi ŝtelis sin unua tra tiu.

La pordon malfermis sinjoro de Saint-Aulaire, kiu ĝuste tiam ekiris en la parkon rozojn ŝirkolekti. La vizito ne trafis neatendite la grafon, kontraŭe, la hundo de la poeto tre surprizis lin. Li decidis en si mem, prefere li igos sin senkapigi ol helpi akiri senmortecon al tiu homo, kiu havas tian hundon. Sed li estis tre delikata sinjoro kaj ne eldiris tion, pri kio li pensis. Kun ridetanta ĝentileco li petis la gaston enpaŝi la ĉambron.

— Bonvolu sidiĝi — li almontris la blazonan fotelon.

La hundo estis pli rapida ol la poeto, ĝi saltis sur la seĝon kaj etendis sian kotan korpon sur la veluro. Alfredo embarasite ridetis, ne sciante kion devas fari la gasto, se lian lokon okupas la favorato de la domo.

— Tute ne gravas — la grafo helpis al li en lia embaraso kaj li karesis la ventron de la hundo kun sincera naŭzo, poste li proponis alian seĝon al la gasto.

— Mi vidas, ke sinjoro grafo ŝatas la bestojn — ekirigis la konversacion Alfredo, kiam sinjoro de Saint-Aulaire kun perforta rideto de klaris, ke li trovas grandan ĝojon precipe en la hundoj. Alfredo citis ion de Lucretius, per kio unuparte li volis diri ion agrablan al la grafo, al la amiko de la hundoj, aliparte li volis pruvi, ke kiel dekadenca poeto, tamen li ne estas la malamiko de la malnovaj klasikuloj. La grafo ĝentile rekonis, ke la fidela hundo estas granda trezoro kaj por serĉi la plaĉon de la poeto, li rakontis al li la historion de la hundo de sinjoro Aubry, kiu vivis en la tempo de Charlemagne kaj ĝi savis la honoron de sia mastro en duelo, per kio ĝi poreterne igis sin digna al la danko de la francaj verkistoj de lernejaj legolibroj.

— Aŭah ! — oscedis la hundo dum la interparolo kaj ĝi palpebrumante certigis la du sinjorojn pri tio, ke ankaŭ ĝi originas el la gento de la Aubry-hundoj kaj ĝi estas preta foroferi sian vivon por la honoro de sia mastro. Intertempe ĝi faris perkape tian movon, kiun la hundoj en soñĝo faras volante ekkapti muŝojn.

La nervoj de De Saint-Aulaire ne eltenis ĉi tiun burĝan nenifaron.

— Eble ni promenu en la parko — li proponis al sia gasto.

Nun evidentiĝis, ke la hundo nur ŝajnigis la dormon. Tuj li metis sin inter la du sinjorojn kaj, ĉar neniu kuraĝis perpiede puŝi ĝin flanken, en la ĝardeno ĝi komencis freneze kaj senĝene konduti. Ĝi saltadis senorde, bojis, skrapis la teron, rulis sin inter la florbedoj kaj ĝi elŝiris plumojn el la vosto de la pavoj.

Sed tion Musset jam ne povis toleri senvorte.

— Eble oni ne devus tion permesi al ĝi — li opiniis senkuraĝe.

— Ne inde eĉ paroli pri tio, mi petas vin, ĝi pasigu la tempon laŭplaĉe — kolere mansignis la grafo.

La gasto ruĝiĝis, ĉar li sentis en la vortoj de la dommastro ioman atentigon. Fakte, kiom lin koncernas, ke la grafo freneze ŝatas ĉi tiun abomenindan bestaĉon ? La malsanoj estas diversaj. Li decidis ne enmiksiĝi plu en la internajn aferojn de la domo kaj se li diros sian opinion pri la hundo, nu, tio estos nura raviĝo pri ĝi.

La hundo faris ĉion eblan por esti inda je ĉi tiu raviĝo. Ĝi puŝe renversis la nano-statuojn, kiuj gardis la florbedojn, funde traesploris la ujon de la malpuraĵoj kaj fine pro interesiĝo por la orfiŝetoj ĝi ĵetis sin en la basenon de la fontano. Tie ĝi pasigis iome longan tempon, sed ĉe la lastaj vortoj ĝi sin prezentis.

Ĝuste tiam, kiam la grafo diris al la poeto :

— Mi ĝojus, se vi restus por tagmanĝo, almenaŭ ankaŭ mia familio povus konatiĝi kun vi.

La hundo skuis sin kaj ĝi ŝprucigis akve la pantalonon de la grafo. Kvazaŭ ĝi estus dirinta :

— Ni povas iri. Mi jam puriĝis kaj ne ekzistas grafa tablo, ĉe kiu mi ne estus dekoro.

Musset, konforme al sia ĵusa decido, afable karesis la maldikan kolon de la hundo :

— Ĉu ankaŭ vi venos kun ni, mia amiko ?

— Ho, kompreneble — tiel ridetis kaj respondis la grafo, kvazaŭ li estus mordinta acidan pomon.

— Frenezaĵo — pensis la poeto, sed esence li ĝojis, ke la hundo tiom persistis al li, ankaŭ nun ĝi enpaŝas la manĝoĉambron apud li kaj kun li. Nun li estis jam certa pri la voĉdono de la grafo.

Dum kelke da tempo okazis nenia malagrablaĵo. Diskrete tintadis la tranĉiloj, forkoj, la geservistoj iradis-venadis per kataj paŝoj ; ili mallaŭte paroladis pri la ĉevalkuroj, ankaŭ la hundo dece marŝadis cirkaŭ la tablo, foje-foje frotante sian kapon al la genuoj de la damoj, sed la kuntiritaj brovoj de la grafo ordonis pacienco.

— Iom da pacienco kaj tuj mi elĵetos ilin — li diris en si mem.

Sed la pacienco de la hundo ne daŭris tiom longe kiel tiu de la grafo. La hundo unue metis nur siajn piedojn sur la tablon, poste ankaŭ kape ĝi interesiĝis, la situacio fariĝis ĉiam neelportebla kaj neniu sciis kion fari. Fine la hundo montris, ke ĝi estas ne nur kuraĝa, sed havas ankaŭ prudenton. Ĝi tiel metis finon al la ĝena situacio, ke ĝi buŝkaptis la surtablan kaponon kaj kuŝiĝis kun ĝi sub alian tablon.

La grafo eĉ post ĉi tiu impertinenteco ne perdis sian toleremon. Li turnis sin kun delikata rideto al la poeto :

— Via hundo havas delikatan guston, sinjoro.

— Mia hundo ? — saltlevis Musset kun mortpala vizaĝo. Ĉu vi pensas, ke via hundo estas la mia hundo ? Ĉi tiu abomeninda monstro ?

— Kiel ? — ekstaris ankaŭ la grafo. Ĉu ĝi ne estas la via ? Ja, vi kunportis ĝin. Ni ne havas hundon.

— Mi renkontis ĝin ĉe la pordo de la kastelo — klarigis la poeto —, mi ne kuraĝis ĝin forpeli pensante, ke ĝi estas la hundo de la sinjoro grafo.

— Kaj mi estimis en ĝi la hundon de la poeto — ridis sinjoro De Saint-Aulaide, sed nun jam elkore. — Mi povas konfesi, se la miskompreno ne malkovriĝas, vi neniam estus fariĝinta akademiano. Sed nun mi ŝuldas al vi tiom da kompenso, ke mi proponas min al vi kiel vian plej sindoneman fidelulon. Tuj forpelu de ĉi tie tiun abomenindan hundaĉon !

La lakeoj malfermis la pordon, ili funde pariĝis por elĵeti la monstron. Ĉar ĉe la grafoj ĉio okazas laŭ ceremonio, dum ili serĉis konvenan bastonon, la hundaĉo rapidpaŝe elŝteliĝis tra la pordo kaj malaperis kun la kapono en la denso de la vivo. Oni devas konfesi, ke ĝi meritis tiun, ĉar ĝi helpis al poeto akiri la senmortecon kaj ĝi plektis inter du homoj ĝismortan amikecon.

***

Jules Janin notis la kernon de ĉi tiu historio kiel aldonaĵon al la naturo de la akademia senmorteco kaj mi opiniis ĝin inda vin rakonti. Neniam oni povas scii, kiu tiros profiton el la instruo de la historio.

El la hungara
D-ro Istvan Nagy

19-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ - 1979-a
V E R D I K T O

NATURA FLORO : « Mi vin amas », de Aldo de GIORGI, el Italujo.
Subpremio : « Ĉu vi memoras... ? », de Julio J. JUANES, el Hispanujo.
JASMENO : Ne aljuĝita.
Subpremio : « Parfumo en la mano », de Josep FERRER SERRANO, el Hispanujo.
VIOLO : « Preĝo », de Julio J. JUANES, el Hispanujo.
Subpremio : « Mi ne volas esti Kaino », de Lina GABRIELLI, el Italujo.
EKSTERORDINARA PREMIO : « Norda printempo », de Zora HEIDE, el Nederlando.
ORIGINALA PROZO : « Fetiĉoj kaj fotoj », de Bernard GOLDEN, el Hungarujo.
Subpremio : « Izraelo », de Ben-Alter JEHIEL, el Izraelio.

Subskribis la Verdiktan Akton :
P. Manuel CASANOVES, CMF, Prezidanto ; Salvador GUMA, R. FERNANDEZ JURADO, Juan VELEZ ; kaj G. MORA i ARANA, Sekretario.
Rubi, la 30-an de septembro 1979-a.

POR VIA DISTRO

HISTORIETOJ

Kompatinda edzineto :

Kiam Bastiano alvenas antaŭ la pordon de sia hejmo, li estas tute ne fiera. Li ne estas ebria ; sed nereziste-bla dorm-bezono preskaŭ ŝanceligas lin.

Kutime neniam li vespere promenas sen sia edzino. Sed li estis akceptanta ĉeesti bankedon memore al la 149-a regimento. Certe li antaŭe avertis sian karan Elizan : « Mi ne revenos antaŭ la II-a. Do enlitiĝu mia karulino kaj dormu ».

Sed tiel rapide fluis la horoj ! Jam la tagiĝo heliĝas malantaŭ la « Butte Montmartre ».

Sur la ŝtuparo, kiun li grimpas kun ŝuoj en mano, la povrulo estas tiel lacega, ke li decidas : « unue dor-mi ! dormi ! dormi ! »

Diskrete kiel ektoplasmo li eniras la edzan ĉambron. La kuk-horloĝo sonas kaj resonas « la sesa ! la sesa !... »

Eliza kviete spiras ; ŝi serene dormas.

Bastiano senbrue metas siajn ŝuojn sur la tapiŝeton kaj sidiĝas sur la liton. Je tiu momento, eĉ ne malfer-mante okulon, la dolĉa Eliza murmuras per voĉo tute nuba je dormo :

« Karulo, ĉu ci jam ellitiĝas ? »

Bastiano tuj ekvidas la « elirpordon ». Malgraŭ sia laceco, kaj sia enorma, enorma dorm-bezono, li, per tono plej « vekita » respondis :

« Jes, mia karulino, mi sentas min tute vigla, hodiaŭ matene : Mi piede iros al mia oficejo » !

Kaj, sibletante, li re-piedvestas sin.

Pri la Nevideblaj :

Viro strangmaniere promenas ; li trenas malantaŭ si ŝnureton ; je ĝia fino estas ... nenio.

Li alproksimiĝas al trafiko-policano kaj demandas :

« Ĉu eble, vi vidis la « Nevideblan Homon ? »

— Ne, respondas iom mirigita la policano » ; sci-voleme, li fikse rigardas la ŝnureton.

Kaj aliulo plu diras :

« ĝuste mi retrovis lian hundon. Se okaze vi Lin renkontas, avertu Lin pri tio ! »

Bona solvo :

Avĉjo estas mortanta.

Je lia litkapo liaj infanoj diskutas : « Pri la enterigo, kion elekti : unuan, duan aŭ trian klason ? « Tiu lasta solvo estas preskaŭ akceptita de ĉiuj, kiam subite oni aŭdas la voĉon de la avo, kiu proponas :

« Se vi volas, mi povas piediri ! »

Novaj problemoj :

LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 69 literoj, kiuj estas nume-ritaj. La literoj estas troveblaj helpe de la sekvantaj ŝlosilvortoj :

31 16 17 14 24 49 68 69 = sudfranclanda urbego.
35 34 25 19 6 40 23 = malantikva.
6 46 13 10 52 17 30 8 54 9 49 = dramo de Ibsen.
15 6 28 44 26 21 60 19 2 66 = esperantista ĉefurb-estro.
51 18 37 38 39 44 27 = miloble mil.
4 5 43 42 11 8 1 24 20 65 = granda arĉmuzikilo.
56 55 59 50 57 7 45 9 = greka insulo marbatala.
33 3 61 58 47 67 33 11 = blanka nubamaso.
10 46 40 14 22 63 12 13 66 32 27 = usona ŝtato.
31 36 20 48 54 62 21 60 64 25 34 = filo de soldato.
16 29 54 41 8 39 = malgaja jarparto.
1 — 69 = sprita deklaro de la filmaktoro Danny Kaye pri la povo de la virinoj.

VORTPLEKTAJO

1 **PRENI**	8 **VENKI**	15 **BESTO**	22 **PALATO**
2 **MULATO**	9 **KORPO**	16 **ORELO**	23 **ELITO**
3 **LUNDO**	10 **AVINO**	17 **PRAVA**	24 **FILMO**
4 **OVALO**	11 **GLASO**	18 **PREMIO**	25 **KARATO**
5 **POETO**	12 **ALAŬDO**	19 **FORKO**	26 **ELEKTRO**
6 **ĈAMBRO**	13 **ACERO**	20 **AROMO**	27 **ĈARTO**
7 **MUZEO**	14 **LEPORO**	21 **MOSKO**	28 **KAROTO**

En la supraj vortoj elprenu unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, for-mu novan vorton. La elprenitaj 28 literoj en la numerita vico formos proverbon, kiu ofte estas aplikebla.

——— ★ ———

SOLVO DE LA ANTAUA PROBLEMO :

Krucvortoj :

	1	2	3	4	5	6	7	8
1	S	I	N	S	E	K	V	E
2	T	R	U	E	T	O	■	L
3	R	A	D	■	E	R	O	D
4	A	D	■	B	R	I	D	O
5	T	O	R	E	A	D	O	R
6	E	■	E	L	■	O	R	A
7	G	U	M	O	■	R	O	D
8	O	N	I	■	V	O	J	O

Alvoko :

La stoko de niaj problemoj estas nun elĉerpita. Ni do estus tre dankaj al niaj legantoj se ili povus sendi al ni problemojn. Koran antaŭan dankon.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

EK

I

DIFINO (PIV) Prefikso signifanta :

1) **Komenciĝantan agon :**
   — ekbatali, ekflori, ekiri, ekkoni.
   — eksonis la sonoriloj.
   — ekbruligu la kandelon.

KOMPARO INTER EK KAJ IĜ

ĉe la statverboj

EK montras pli rapidan agon :
   — eksidi, ekkuŝi, ekstari.

IĜ montras pli trankvilan agon :
   — sidiĝi, stariĝi kuŝiĝi.


2) **Momentan, nedaŭran agon :**
   — ekbati, ekpafi, ekpensi, ekridi, eksalti, ekvidi.

RIMARKO (PIV)

EK same kiel ĝia kontraŭo,

AD esprimas, ĉe la preterito, la francan « simplan pasintan tempon » por montri simplan, nedaŭran tempon.

Ek al bona ripozo !



— Ja, ankaŭ roboto meritas ripoz-momenton en la taglaboro, almenaŭ por gluti la la kelkajn oleoglutojn necesajn al ĝia bona funkciado. Tamen mi jus kuŝiĝis kaj endormiĝis, ke tiuj stultaj buboj eksaltigis min per siaj krioj.

— tio ĉi enuigis la sinjorinon, ŝi ekbrulis de envio.
— la vento ekŝancelis la akvon.

II

INTERJEKCIO : Faru vian devon, ek ! Ek al la kongreso !

III


EKDE (= de la komenco de) :
ekde tri jaroj li malsaniĝis.

Laŭaĝaj deziroj :



— Vi volas du frankojn por aĉeti bombonojn ? Vi ne plu estas bubo ! Ekde nun estas la momento, por vi, ekpensi pri pli normalaj gustoj !
— Onjo, vi tute pravas ! Donu al mi kvin frankojn por aĉeti cigaredojn.

Ekster ĉia fantaziaĵo :



— Karulo, mi tre ĉagreniĝas. Pri nia edziĝprojekto, Paĉjo ekkoleris kaj tute rifuzas vin kiel bofilon.
— Jes, tute vere. Ek iru for ! Neniam fantaziuloj eniris en nian familion. Ek iru ! Ek iru !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (280 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2 400 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1980, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Peu à peu, le programme de l'été se met en place. Les conférences seront cette année encore nombreuses et variées, complétées pendant la dernière semaine du premier stage par le « seminario pri rektmetoda instruado de esperanto ». La deuxième période vera les activités qui ont fait leurs preuves l'an dernier : cours de débutants par la méthode directe, pratique de la langue (se procurer le manuel « Por la Praktikantoj »), étude de textes (se procurer « Pasoj al Plena Posedo »), traduction et travail sur la grammaire pouvant aider à la préparation du Kapableco. Les responsables habituels animeront la troisième période. Les demandes de renseignements sont assez nombreuses et laissent espérer une participation au moins aussi importante que l'an dernier.

Avant ces activités d'été se sera déroulé le programme de printemps. La rencontre d'enfants s'annonce bien. Il est un peu trop tôt, au moment où j'écris ces lignes, pour préjuger de ce que sera la rencontre des « fervojistoj », les inscriptions devant nous parvenir groupées.

Nous parlons toujours et, en priorité, des périodes où les portes et les fenêtres de Grésillon sont ouvertes. Nous parlons du travail de préparation des stages, l'administration, l'organisation des finances. Et le reste ? Beaucoup ignorent, ou ont oublié, que si la Maison Culturelle se réveille apparemment sans problème à Pâques, c'est que pendant tout l'hiver quelques personnes ont veillé sur son sommeil ou plutôt sur son engourdissement. Car, si le château dort, la Maison Culturelle continue à vivre, au ralenti. Non seulement il faut préparer la saison à venir, non seulement il faut préserver le parc et les bâtiments et faire en sorte que ceux d'entre vous qui reviendront aient l'impression d'une continuité malgré les atteintes des tempêtes et du vieillissement des choses, le désir de revanche de la nature sur le monde organisé, même au minimum, des hommes. Il faut aussi que certains services continuent à fonctionner, en particulier les cours par correspondance et le Libro-Servo.

Tout au cours de l'année, Mme Guillot assure la réception des inscriptions aux différents cours, l'expédition du matériel, les relations avec les correcteurs. Elle regrette seulement de ne pas avoir plus de travail. Douze mois sur douze, le Libro-Servo fonctionne aussi. M. Ciret fait des dizaines et des dizaines d'envois, non seulement en France, mais encore dans tous les continents, en particulier en ce qui concerne les éditions de la Maison Culturelle. Vous pouvez lui commander tous les livres portés sur le catalogue dont les prix sont malheureusement instables, et aussi toutes les nouveautés que nous nous efforçons de mettre à votre disposition dès leur parution. N'hésitez pas à nous commander vos livres (la littérature espérantiste s'enrichit de plusieurs œuvres par mois). Recommandez nos cours à vos amis. Vous apporterez ainsi à Mme Guillot et à M. Ciret une justification encore plus grande de leur dévouement et vous aiderez à conserver à la Maison Culturelle ce courant de vie qui, à travers l'immobilité de l'hiver, relie l'activité de l'été à celle du printemps suivant.

P. BABIN.

INTER NI

Iom post iom la somera programo preciziĝas. Ankaŭ ĉijare la prelegoj estos nombraj kaj valoraj. Dum la tria semajno de julio okazos la « seminario pri rektmetoda instruado de Esperanto » gvidata de S-ino Audrey Childs-Mee. La dua periodo proponos la kvar kutimajn kursojn kaj la tria estos gvidata de la sama « taĉmento » kiel lastan jaron. La informpetoj esperigas kontentigan nombron da partoprenantoj.

Ni precipe parolas pri la printempaj kaj someraj aktivoplenaj periodoj, kaj pri la grava preparlaboro. Fakte pluraj personoj laboras por ke la vizitantoj retrovu kastelon similan malgraŭ la atakoj de la ventoj, la maljuniĝo de la aĵoj, la venĝo-deziro de la naturo kontraŭ la organizita mondo. Plie konstanta vivo fluas tra la Domo-organismo. Daŭre funkcias la perkoresponda kurso-servo kaj la Libro-servo. Dank'al la sindonemaj deĵorantoj, kontaktoj ekzistas dum la tuta vintro. Dank'al S-ino Guillot kaj S-ro Ciret ekzistas ponto inter la someraj aktivaj tagoj kaj la printempa revigliĝo.

NOS JOIES

Le 29 mars 1980, Stéphane Jacquesson a épousé Sylvie Mirault. Stéphane est le fils de Pierre et Josette Jacquesson, conseillers techniques de la M.C.E., et petits-fils de Mme Micard. Nos félicitations aux parents et à la grand-mère, et tous nos vœux de bonheur aux jeunes époux.

NOS PEINES

Nous avons appris le décès de Gaston Cambillard, vieil et fidèle ami de notre Maison Culturelle. Nous présentons à sa famille nos bien sincères condoléances.

PARTICULIEREMENT ADAPTE
A VOS COURS DE PRATIQUE.

UTILISE DANS PLUS DE DIX PAYS

"POR LA PRAKTIKANTOJ"

PLUAJ PAŜOJ AL PLENA POSEDO

prezo : 20 francs

Rabato por mendo de pli ol 5 ekzempleroj

Mendoj al nia LIBRO-SERVO

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE
Château de Grésillon - 49150 BAUGÉ

C.C.P. : Nantes 1485 39 P
Téléphone :
- pendant les stages : **(41) 89-10-34**
- hors des stages : **(40) 76-77-95**

Programme 1980

CONFERENCES

arrivée Mardi 1er Juillet — départ Lundi 21 Juillet

— Conférences sur des thèmes variés. — A partir du 14 : « Seminario pri rektmetoda instruado ».

— Discussions.

— Etude et pratique de la langue.

— Connaissance de la région.

COURS

arrivée Mardi 22 Juillet — départ Lundi 11 Août

— Cours pour débutants (méthode active - directe).

— Pratique de la langue en groupes (manuel : « Por la Praktikantoj) »..

— Ateliers divers (traduction, étude d'une œuvre, grammaire...).
(Manuel : « Paŝoj al plena posedo »).

— Connaissance de la région.

— Travaux manuels.

ACTIVITES MANUELLES ET ARTISTIQUES

arrivée Mardi 12 Août — départ Lundi 1er Septembre

— Photographie (prise de vue, développement, montages...).

— Danses folkloriques.

— Activités manuelles.

— Etude et pratique de la langue.

N.B. — Des sessions d'examens pourront avoir lieu. Mais les cours donnés à Grésillon ne préparent pas spécialement à ces examens. Sauf pour les débutants, ils n'ont pour but que de parfaire et préciser des connaissances antérieures.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	25,00
Pendentifs	:	20,00
Porte-clés	:	20,00
Coupe-papier	:	35,00
Thermomètres voitures	:	35,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	4,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 50 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : **20,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

TRIGROŜA ROMANO

de **B. BRECHT**